# La Krokodil'

**Informilo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo**

**n°60**
**julio**
**2010**




**En Ĉi tiu numero:**


Festo en Donneville!..............................................1
Helpantoj serĉataj.................................................2
Materialo serĉata...................................................3
Envie de participer à FESTO ?...............................3
En cette fin de saison.............................................4





Suite à une décision inattendue de son CA du 04 juillet, l'université Paul Sabatier a refusé l'ouverture du Paul Etudiant cet été, notre lieu principal prévu pour Festo. Après deux semaines de recherches sans succès d'un lieu de remplacement toulousain, nous avons décidé d'installer FESTO 2010 à Donneville (20km au sud-est de Toulouse) dans un grand terrain prêté par Floreal Martorell (Vinilkosmo/Eurokka), avec le soutien de la mairie. Désormais, il nous reste un peu plus de 3 semaines pour être prêts à accueillir les plus de 180 inscrits à ce jour !

D'une rencontre urbaine, FESTO devient plutôt un festival en plein air avec les avantages et les inconvénients que ça engendre. Nous organiserons un système de navette et de covoiturage pour faciliter le transport à partir de Toulouse. Le programme n'est pas modifié et commence à prendre forme. (voir l'encart)

Nos besoins en bénévoles et en matériel de par ce déménagement sont encore plus nombreux. Nous comptons plus que jamais sur vous, Le krokodil' est consacré en partie à ces besoins.

*Konsekvence de neatendita decido de la Administra Konsilio de la 4a de julio, la universitato Paul Sabatier rifuzis la malfermon de Paul Etudiant dum la somero, nia ĉefa planita loko por FESTO. Post dusemajna sensukcesa serĉado de anstataŭa loko en Tuluzo, ni decidis instali FESTOn 2010 en Donneville (20km sudoriente de Tuluzo) sur granda tereno pruntita de Floreal Martorell (Vinilkosmo/Eurokka), kun la subteno de la urbodomo.*

*Ankoraŭas iom pli ol 3 semajnoj por esti pretaj akcepti la ĝisnunajn pli ol 180 aliĝintojn!*

*El urba renkontiĝo, FESTO fariĝas surkampan festivalon kun la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj, kiujn tio naskas. Ni organizos sistemon de navedoj kaj de kunveturado por faciligi la vojaĝoj ekde Tuluzo. La programo ne estas modifita kaj ekprenas formon (vidu la kromfolion).*

*Niaj bezonoj pri helpantoj kaj materialo, pro tiu translokiĝo, estas eĉ pli multaj. Ni pli ol ĉiam kalkulas je vi, la ĉivespera Krokodil' estos parte dediĉita al tiuj bezonoj. Jam la venontan semajnon, helpo estos bonvena por prepari la terenon kiu akceptos la renkontiĝon.*

***Marion***

# - HELPANTOJ SERĈATAJ - APPEL A BENEVOLES




Une rencontre de plus de 180 personnes ne se fait pas sans mal!

Au niveau de l'organisation, à cause de ce déménagement de dernière minute à Donneville, nous avons déjà eu une bonne dose d'émotion et de travail, mais nous sommes plus que jamais motivés pour réussir un grand FESTO 2010, déjà exceptionnel par le nombre de participants. Désormais, nous comptons sur vous tous pour nous épauler dans les semaines qui viennent, pendant et après la rencontre.

Nous avons besoin d'aide pour toute une série de taches indispensables à la tenue de FESTO. Nous avons besoin de bénévoles enthousiastes pour s'engager sur quelques unes d'entre elles dans la bonne ambiance et l'interculturalité!

Pendant FESTO, du 13 au 20 août :

**Nous avons besoin de titulaires du Brevet de secourisme**, ou de diplômes d'infirmier ou de médecin pour assurer une veille de quelques heures par jour, en cas de problème de santé, et assurer les premiers secours (en relation avec le médecin de Donneville et les pompiers).

**Nous avons besoin de titulaires du permis de conduire** depuis plus de 3 ans pour assurer des navettes entre Donneville et Castanet (piscine ou terminus bus pour Toulouse), Donneville et Montgiscard (Supermarché) avec leur voiture personnelle (frais kilométriques remboursés) ou dans un minibus de location.

**Nous avons besoin de bénévoles pour intégrer des équipes** pour :

- Cuisine/service (plutot fin d'après-midi),
- Ménage (après-midi) toilettes, vestiaires douches, poubelles
- Surveillance, permanences autour des tentes, du matériel sur le terrain, surtout lors des journées à Toulouse (samedi, jeudi)
- Courses (aller acheter ce qui manque)
- Accueil (libroservo, informejo)
- Atelier vélo (assurer l'entretien et les petites réparations sur la flotte de vélos)
- Buvette (fin d'aprem, soir, nuit)
- Petit déjeuner (matin)



**Avant et après FESTO (dès le 1er aout)**

Nous avons besoin de monde aussi pour préparer le terrain, pour l'installation, le montage des tentes et des toilettes sèches , le collectage du matériel prêté, la décoration, le fléchage, l'affichage/distribution de prospectus dans Donneville. Et à partir du 20, le démontage etc...

Il est évident que selon l'importance de la tache, le nombre d'heures consacré, les bénévoles auront droit à des repas ou à des boissons gratuites et à des rabais plus ou moins importants sur leur cotisation (le montant sera calculé à la fin de FESTO selon le nombre de bénévoles et selon le bilan financier de la rencontre).

Marion s'occupera de la coordonation des bénévoles en lien avec les divers responsables.

Pour se proposer, poser des questions:

Marion : 06 87 64 75 84 ou marion.quenut@laposte.net

# MATERIALO SERĈATA !
# On recherche du matériel.

Ce changement de lieu non prévu a augmenté nos besoins en matériel pour le logement et les transports. Si vous pouvez prêter pendant une semaine (du 13 au 20 août donc) un ou plusieurs de ces objets, merci de me contacter au plus vite : Marion : 06 87 64 75 84



HEBERGEMENT :
-- Tentes (2 à 3 places)
-- Matelas pneumatiques
-- Matelas normaux
-- Lits de camp
-- Draps/couvertures
-- Sacs de couchage
-- Tapis de sol
-- Vieux tapis/vielle moquette

TRANSPORTS
-- Vélos (tout type, en bon état)
-- Antivols (solides pour les vélos)
-- Deux voitures avec 5 places (ou plus) pour navettes (pendant festo du 13 au 20 aout)
-- Une ou 2 Voitures avec grand coffre ou utilitaire pour collectage de matériel du 09 au 12 aout
*On aurait des chauffeurs si vous ne voulez pas conduire vous même et si vous êtes assurés pour des tiers.*

AUTRES
-- Tonnelles
-- Jeux d'extérieur / Jeux d'intérieur
-- Grandes poubelles ou caisses plastiques (pour vaisselle)
-- Rallonges électriques
-- Bâches (non, il ne pleuvra pas !)

Cette liste sera susceptible d'évoluer et se complétera d'ici le 13 août selon les besoins et les propositions déjà faites, je vous resolliciterai par courriel très bientôt.

## VOUS AVEZ ENVIE DE PARTICIPER A FESTO 2010 ?

Vous pouvez encore vous inscrire pour toute la semaine (sans supplément de date d'inscription) **jusqu'au 8 août** (pour des questions d'organisation merci de le faire au plus vite) sur le site : esperanto-jeunes qui sera mis à jour dès demain.

Si vous inscrivez à la journée, il vous en coutera **7€/jour** pour la participation au programme, si vous ne passez que pour faire un tour un soir, l'entrée sur le site sera à prix libre (mais nécessaire). Vous ne recevrez pas par contre le magnifique livret de la rencontre.

Si vous n'êtes pas motorisé et désirez venir à FESTO, c'est possible, nous allons organiser un système de navette ou de covoiturage jusqu'au soir, mais nous prévenir à l'avance (au moins la veille). Pour manger, une petite restoration sera proposée sur place à la buvette.

Il sera toujours possible de dormir sur place pour 3€ en tente (si vous avez votre tente), 5€ en dortoir sous une grande tente (avec votre sac de couchage)

**Pour les adhérents à EKC de moins de 30 ans**, l'association paiera une partie de votre cotisation à hauteur de 15€. Vous pouvez encore adhérez d'ici le 13 août!

Si vous avez des questions : Contacter Marion 06 87 64 75 84

# En cette fin de saison...

...on peut considérer que les activités de l'association ont été plutôt riches. Outre les cours qui sont organisés habituellement, les temps forts qui méritent d'être mentionnés par ordre chronologique sont :

-- le stage du mois de juin à Arrout,

-- le Forom des Langues

-- le village associatif du Festival mondial de la Terre

-- l'apéritif de fermeture de la bibliothèque d'EKC

## Le stage à Arrout (5 et 6 juin)

Passer quelques jours à Arrout en compagnie de nos amis de la Sunkompanio est toujours un plaisir, d'autant plus au printemps quand le soleil est au rendez-vous. A l'occasion de ce dernier stage, nous avons eu la visite d'un quinzaine de stagiaires venus d'Ariège, de Revel et de Béziers. Comme toujours, l'ambiance a été familiale et bon enfant.

## Le Forom des Langues (12 et 13 juin)

L'événement majeur de l'année pour tous les amoureux des langues. Comme toujours, EKC était au rendez-vous, représenté par plusieurs adhérents et sympathisants. On a noté cette année une légère diminution du nombre de stands et de visiteurs... s'agit-il d'un dégât collatéral de la Coupe du monde ? En tout cas, on peut se féliciter de la moisson de nouveaux contacts réalisée à cette occasion, collecte absolument essentielle pour faire connaître nos activités et les développer.

## Le Festival mondial de la Terre (le 23, et du 25 au 27 juin)

Un autre rendez-vous auquel nous sommes maintenant habitués. Si ce Festival souffre d'un défaut d'information auprès du public, il a aussi été l'occasion de présenter l'espéranto à des promeneurs curieux et de prendre quelques contacts.

## L'apéritif de fermeture de la bibliothèque (28 juin)

Une nouveauté ! Les adhérents et sympathisants de l'association ont été conviés à un apéritif dans le local occupé par la bibliothèque à l'occasion de son dernier jour d'ouverture avant la pause estivale. Une dizaine de personne était présente, dont bien sûr Rikardo en sa qualité de bibliothécaire, toujours disposé à donner des conseils de lecture à ceux qui ne souhaitent pas partir en vacances sans quelques livres d'espéranto dans le sac... L'idée d'un apéritif d'ouverture fait son chemin ! Et d'ailleurs...

## ...quoi de prévu l'an prochain ?

Pour l'instant, rien de bien clair. L'organisation un peu perturbée de FESTO 2010 nous a empêché de fixer le calendrier des activités de l'an prochain. Ce qui est sûr, c'est qu'il y aura toujours des cours express, des cours de pratique, des stages, la bibliothèque, les rencontres au café Le Cactus...

Par ailleurs, nous avons encore le projet de refaire un séminaire de méthodologie sur l'enseignement de l'espéranto. Un autre projet est celui d'un atelier sur l'apprentissage et l'utilisation de l'espéranto par Internet. Ces deux projets ont toutes les chances d'être réalisés... mais les dates seront anoncées dans un prochain Krokodil'

**Agrablan someron al ĉiuj... kaj venu al FESTO!!!**

***Christophe***

**ESPERANTO-KULTUR-CENTRO DE TULUZO**
*Centre Culturel Espéranto de Toulouse*
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 — 06 31 68 00 26
esperanto.toulouse@free.fr
http://esperanto.toulouse.free.fr

# FESTO 2010 - Programo

La programo de Festo 2010, okcitaneca ĉijare, pliriĉiĝas iom post iom : koncertoj, ekskursoj, vesperoj, ... Sendube, vi ne enuos !

Festo sendube, estos La Esperanto-Muzika festivalo de la Somero ! Denove Festo-teamo, partnere kunorganizata kun la helpo de EUROKKA, kreos bonegan muzikprogramon. Vi estas bonveniga proponi viajn proprajn kontribuojn (pere de retmesaĝo en la listo festo@yahoogroupes.fr).

Por unua fojo, Festo okazos en Tuluzo kaj Donneville. Tie loĝas JoMo kaj Flo ! (el Vinilkosmo). Jam ni povas imagi buntan programon...Programo

**Ĉiutage, je la 10a30** : okcitanaj kaj katalunaj kursoj / Kursoj de esperanto por komencantoj

**Vendrede, 13/08**

- 21a00 : Interkona vespero

Ludoj kaj libere improvizita programo kun la surlokaj muzikistoj, Emĉjo, Kvenĉjo, Platano, Gijom, JoMo, ktp...

**Sabate, 14/08**

- 16a : okcitana posttagmezo en Tuluzo
- 19a : okcitana vespermanĝo en la Okcitana Domo (*Ostal d'occitània*)
- 21a : okcitana vespero kun slama koncerto de Lou Dàvi en la korto de la Okcitana Domo

Ekde dimanĉo, okazos **kantateliero gvidata de KAJTO** (je la 14a30 ĉiutage krom ĵaŭde je la 10a30).

**Dimanĉe, 15/08**

Folka mondmuzika vespero :

- 21a00 : Martin Wiese (sola)
- 22a00 : JoMo kaj Liberecanoj

**Lunde, 16/08**

Tuttaga ekskurso : bicikla laux la suda kanalo

Teatra + kanzon-hiphopa vespero :

- 21a : TTT (Tuluza Teatro-Trupo)
- 21a30 : Gijom
- 22a30 : Platano + Hiphopa vespero

**Marde, 17/08**

Duontaga ekskurso : Andoro aŭ L'Isle Jourdain

Roka vespero :

- 21a30 : Dancers in red
- 22a30 : Martin & la Talpoj




**Merkrede, 18/08**

Tuttaga ekskurso : Albi/Cordes-sur-Ciel.

Tradicia bala vespero :

- 21a30 : JoMo sola
- 22a30 : Kaj Tiel Plu kun balo

**Ĵaŭde, 19/08**

Kajto ĉe Tuluzo-Plaĝo + Teatra kaj internacia vespero :

- 18a : KAJTO ĉe Tuluzo-Plaĝo (*Les pauses musicales d'été* en *Quai de la Daurade* en Tuluzo)
- 21a30 : TTT (Tuluza Teatro-Trupo)
- 22a : Internacia vespero

## Artistoj

**Dancers in red**



Memoru pri viaj unuaj sentoj pro morda gitaro, pro drumsono inda je Alfredo Hernándezj kaj ĉarmo-roka basistino, ĉion enkondukante frenezan koncerton. Dancers in Red, juna tuluza muzikgrupo, starigos en vi tian rokan furoron tiel disvastiĝantan. Tiu triopo ja estas fervora pri scenejo, ilia plej ŝatata ludejo. Ilia muziko pruntas ĉe la juna generacio de The Hives kaj aliaj Late of The Pier, sen forgesi 1970-jarajn praulojn de usona ŝtonroko. La grupo formiĝis en 2008 kun Guimss, bateriisto "kolink-stila" kaj inda je lia abdomena famo, Marion, basistino kun frapantaj notoj, kaj Mathieu, juna senlimulo per iu kelkfoje sanga Gibson. Kun Dancers in Red, la tuluza roka scenejo estas tiom pli esperiga ! Kun agresemaj ripetgrazoj kaj energiaj melodioj, ili nur volas havi kaj doni plezuron.

ĉe MySpace

**Emĉjo**

Nia kara Jefo-prezidento aŭdigos sian radio-faman voĉon por repumi aŭ ankaŭ violonludos.

**Gijom**

Gijom jam koncertis dum Festo 2009. Denove, Guillaume forlasos la parizajn pianojn por la piano de la gastejo. Li kunportas en siaj valizoj siajn novajn komponaĵojn en la franca kaj en esperanto kaj malkovrigos al ni siajn kanzonojn eltiratajn de ekologia agrikulturo. Gijom ĉe Ipernity

**JoMo kaj Liberecanoj**



JoMo (Jean-Marc Leclercq) komencis muziki en la jaro 1977 (Caniveau, Les Diam's, Queen Bees, ktp...), kaj ekesperantiĝis en 1988.

Tute nature li do decidis kanti kaj verki en la lingvo internacia. Li surpiedigis sian propran tiaman grupon, *La Rozmariaj Beboj*, kiu ekfamiĝis komence de la jaroj 90 en la franca alternativa rok-medio. La bando turneis en diversaj landoj (el kiuj Ĉinio), produkis du albumojn, kaj eĉ koncertis sur la prestiĝa pariza scenejo Olympia.

Post disiĝo de la Beboj, JoMo kreis novan grupon, **Liberecanoj**, kun kiu li surbendigis septitolan liberecanecan albumon ĉe Vinilkosmo kaj kreis unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kantoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la libro Guinness.

Poste kaj sole, li surbendigis en la novaj studioj de Vinilkosmo tutan esperantan albumon titolitan JoMo friponas !, kiu aperis fine de 2001. Sekva disko, jOmO slavumas, aperis printempe de 2006 kun multaj muzikistoj slavstilaj, kun kiuj JoMo kunludas.

Li daŭre koncertas esperante kaj multlingve, sola kun gitaro, kantante ĝojajn kaj dancigajn kantojn.

**Kaj Tiel Plu**



Kaj Tiel Plu naskiĝis kiel duopo fare de Pep Tordera kaj Xavier Rodon en la jaro 1986 en Casteło (Veneto, Italio) kun la celo alporti la katalunan muzikan tradicion al esperantaj medioj. Tuj poste aliĝis al la bando Josep Maria Milla kaj Carles Vela. Tiam okazadis diversaj koncertoj en Italio, Hungario, Nederlando, Francio, Okcitanio, Eŭskio... kaj aliĝis unuafoje ina voĉo : Núria Oller. En la jaro 1989, la grupo eldonis "Fajreroj, Unua kataluna kantareto". En la jaro 1992, pro la elmigrado de Pep al Usono, la agado de la grupo iĝis pli malaktiva.

Kaj Tiel Plu revigliĝis en la jaro 1998 okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en la okcitana urbo Montpeliero. Núria, pro familiaj kialoj, estis anstataŭita de Luz Vázquez, kaj aliĝis al la bando ankaŭ Ferriòl Macip, Javier Muñoz, Antonio Alberca, Pau de Nut, kaj poste Elena Milla kaj Carles Badia. Tiam ekvideblis la rezultonta konsisto (gitaro, mandolino, flutoj, violono, violonĉelo, kontrabaso, perkutiloj kaj voĉoj), kaj la repertuaro plivastiĝis al okcitana tradicio ekde la trobadoroj ĝis la nuntempo, kaj al la judhispana tradicio.

La nuntempa konsito de la bando estas Àngel Ribas (akordiono), Anna Sánchez (perkutiloj), Carles Vela (flutoj kaj voĉo), Elena Milla (perkutiloj kaj voĉo), Ferriòl Macip (violono kaj voĉo), Isaac Barrera (kontrabaso), Josep Maria Milla (mandolino kaj voĉo), Pau de Nut (violonĉelo), kaj Xavier Rodon (guitaro kaj voco) kaj proponas koncertojn kaj balojn per muzikoj tutmondaj.

Ĝis nun ili eldonis tri albumojn en la eldonejo Vinilkosmo : Sojle de la klara temp' (2001), Plaĉas al mi (2004) kaj Surplacen venu vi (2009).

**Kajto**



En la jaro 1988 la grupo *Kajto* komencis kanti kantojn kun Esperanto-tekstoj.

Dum la somero de 1989 - dum la UK en Brajtono en Anglujo - la KD-o *Kajto* estis prezentita, tiu KD ankaŭ montriĝis esti la unua eldonita Esperanto-KD iam en la mondo.

Dum la jaroj kiuj sekvis, la grupo vojaĝis al multaj landoj por koncerti kaj eldonis entute 5 KD-ojn.

En la jaro 2004 - en la urbo Aalen en Germanujo - la FAME Kulturpremio estis aljuĝita al 'Kajto' kiel rekono de la graveco de ĝia kontribuaĵo al la Esperanta muzik-kulturo.

Nuntempe 'Kajto' konsistas el Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer kiuj uzas ĉi tiun nomon por ilia Esperanto-repertuaro.

Jam de 1980 Ankie kaj Nanne kune muzikas. Komence en la Frisa grupo *Irolt*, poste en *Kat yn 't Seil*, *Kajto* kaj *Liereliet*. Kun tiuj grupoj aŭ duope, kantante en Esperanto, en la Frisa kaj Nederlanda lingvoj, ili registris pli ol tridek da Vinilaj Diskoj kaj Kompakt-Diskoj kaj regule koncert-turneis tra multaj landoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Nord-Ameriko kaj Aŭtralio. Ekzemple, dum la somero de 2009 Nanne & Ankie turneis en Usono dum 10 semajnoj.

Koncerne la kantotekstojn Kajto ne konas limojn. Nanne kaj Ankie kantas pri diversaj temoj. En ilia repertuaro maraj kaj historiaj temoj ludas gravan rolon sed ili prikantas ankaŭ komikajn okazaĵojn el la ĉiutaga vivo. Same ili ŝatas enmuzikigi Esperantajn kaj Frisajn poemojn.

Dum festivaloj, kafo-koncertoj, kulturaj vesperoj aŭ kantostaĝoj, la programo de Ankie kaj Nanne estas ĉiam humurplena kaj taŭge adaptita al la situacio, kie ajn ili troviĝas. Dum koncertoj la du Kajtanoj povas anonci kaj enkonduki siajn kantojn en diversaj lingvoj kiel Esperanto, la Nederlanda, la Frisa, la Franca, la Angla kaj la Germana.

Ili sin akompanas per diversaj instrumentoj kiel gitaro, mandolino, koncertino (sesflanka akordioneto) kaj kontrabaso.

Dum la unua jardeko de la nova jarcento ili eldonis dek-unu novajn KD-ojn en diversaj lingvoj kiel Esperanto, la Frisa, la Nederlanda kaj ankaŭ en la Angla.

Por pli da informo pri Kajto, Nanne & Ankie kaj iliaj KD-oj, vizitu ilian retejon.

Kajto gvidos la kantatelieron kaj koncertos en "*Les pauses musicales d'été*" en *Quai de la Daurade* en Tuluzo.

**Kvenĉjo**

Sendube, li kunportos sian akordeonon kaj forlasante la kason de Festo, li muzikludos en la koncertejo, la gufujo, la manĝejo, la amasloĝejo, ... ;)

**Lou Dàvi**



LOU DÀVI estas okcicantlingva komediisto, radioelsenda parolisto, poeto, kantisto kaj fama ĉe la slama tuluza scenejo kiel « la okcitana slamisto ».

En 2004, post reveno de Irlando kie li forestis dum du jaroj, li malkovris scenejojn kie nova parola esprimstilo praktikata estas nomata "Slam".

Li prezentas ankaŭ radioelsenton ĉe Radio Occitanie (Dub Experiença) pri temo de regeaj muzikoj en la mondo, kaj prezentos dum pli ol unu jaro gravan rendevuon de slamaj tuluzaj scenejoj kun la grupo "La Phrase D'En Bas".

Tiel Lou Dàvi ŝatas kanti, paroli kaj ĉefe deklami. Sed tio kion li plej adoras estas surprizigi sian publikon. Ne gravas ĉu oni komprenas la okcitanan, ĉar emocion transdonas Lou Dàvi dum sian recito.

Lia paĝo ĉe MySpace

**Platano**



La fama aktivulo de la muzikgrupo La Pafklik, kiu jam lastjare koncertis sole kun Gijom kaj Tone kaj Emĉjo denove movigos la partoprenantaron.

Lia famega grupo kiu aperigis la unuan albumon de repo en Esperanto, forlasos la kvartalaĉojn de Parizo por deklami sian rabion sur la tuluza scenejo. La repisto forkrios iliajn rimojn samtempe acidajn kaj konsciajn per famaj muzikpecoj kiel interalie « *Bum bum kanabis* », « *Komerca* » kaj sendube « *Fek al Esperanto* ».

Legu pli en tiu artikolo La unua repdisko 100% en Esperanto haveblas !.

Antaŭ lia koncerto, kantos la tuluza repisto *Whity* kiu baldaŭ aperigos albumon nomatan *Black Esperanto*. Whity ĉe MySpace.

**Martin Wiese & la Talpoj**

Martin Wiese estas famkonata en la esperanto-muzika movado. Li debutis jam en la internacia esperanto-rokbando *Amplifiki* en 1986 kaj poste rolis kiel ĉefkantisto kaj gitaristo en la esperanta rokbando *Persone* post la foriro de Börje Lund.



Post la malaktiviĝo de *Persone*, Martin koncertis ofte sole, kaj eĉ dum *Persone* jam ekis solokarieron kun la apero en la dua volumo de Vinilkosmo-kompil' en 1996 per la titolo *Vivo duras sed vi molas*. Paralele Martin estas membro ankaŭ de la bando *Jetpilot* kaj tie kantas en la angla .

**Martin & la Talpoj** estas pli-malpli la soloprojekto de Martin Wiese subtenata de diversaj amikoj-muzikistoj, kiuj helpas registri liajn kantoverkojn aŭ ankaŭ akompanas lin sur scenejo (furora kaj ne forgesebla publika apero de la Talpoj okazis dum KEF 2009 en Danio).

Martin & la talpoj daŭrigas la mision de Persone : nome krei eksterordinare bonan poprokan, elektrik-akustikan alternativan muzikon kun altvaloraj tekstoj en esperanto.

La unua albumo de Martin & la Talpoj, *Pli ol nenio* aperis ĉe Vinilkosmo en 2007. Ĝi estas nepre aŭskultenda verko. Kaj kiel talenta grafisto li mem desegnis sian portreton por la diskokovrilo.

**TTT**



Tuluza Teatro-Trupo estas grupo de geesperantistoj progresantoj kaj pli spertaj ekpretigadas teatraĵojn por plibonigi sian regon de la internacia lingvo.

De du jaroj, la Teatra Trupo de Tuluzo prezentas du teatraĵojn verkitajn de Rikardo Cash, en Tuluzo, Francujo, kaj tutmonde.

- la Grandioza Kongreso (Movada farseto de Rikardo Cash) "En deko da kelkminutaj skeĉoj, unuafoja kongresano renkontas variajn kongrestipulojn." Pri ĝi : Teatro : En Paŭo, estos "La Grandioza Kongreso" !
- la Duonhora Pluvego (Unuaktaĵo de Rikardo Cash) "Du virinoj, kiujn ĉio disigas en la vivo, hazarde renkontiĝas pelite en kafejon pro subita pluvego. Unue iliaj malsamaj karakteroj kaj vivspertoj kaŭzas konflikton, sed iom post iom ili konatiĝas kaj ekŝatas unu la alian."

---

# Ekskursoj

- Tuttaga ekskurso al Andoro (pli da informoj baldaŭ)
- Tuttaga ekskurso al L'isle-Jourdain (pli da informoj baldaŭ)
- Ekskurso al la spacurbo (*Cité de l'Espace*) verŝajne ĵaude la 19an
- Ĉiutaga ekskurso al la naĝejo de Castanet

- Ekskurso al Cordes-sur-Ciel kaj al Albi

Tiuj du mezepokaj urboj staras inter la ĉefaj vidindaĵoj de ĉi tiu regiono.

**Cordes-sur-Ciel** estas urbeto konstruita sur monteto kaj defendata de muregoj. La antikvaj domoj estas en gotika stilo kaj laŭ ĝiaj malnovaj stratoj troveblas multaj metiejoj kaj artistejoj.

**Albi** estas unu el la ĉefaj urboj de la regiono. Ĝia plej fama momunento estas la impona gotika katedralo konstruita tute el brikoj. Ĝi cetere estas konata kiel la naskurbo de la pentristo Henri de Toulouse-Lautrec, al kies verkoj estas dediĉita la samnoma muzeo.

**Atentu : la lokoj al tiu ekskurso estas limigitaj ! Bonvolu aliĝi kiel eble plej frue ci-sube. Aliĝkosto : 5€ (aŭ 7€ por pli-ol-30-jaruloj). La viziton de la muzeo pagos aparte tiuj, kiuj deziras (po 2,50€).**

***CE PROGRAMME EST SUSCEPTIBLE D'ETRE LEGEREMENT MODIFIE ET ENRICHI DES CONFERENCES, DISCUSSIONS, ATELIERS QUI SERONT PROPOSES CHAQUE JOUR.***

***POUR SE TENIR AU COURANT DES MODIFICATIONS, VISITEZ LE SITE INTERNET DE FESTO 2010, D'OU EST TIRE CE SUPPLEMENT :http://esperanto-jeunes.org/Programo-de-Festo-2010?lang=eo***

***NOUS VOUS INFORMERONS EGALEMENT PAR COURRIEL.***